

VESPERTO



LITERATURA FOLIO

Numero:216 .
Majo 2010. 18-a jarkolekto

Redaktanto:

Apáti Kovács Béla
Kaposvár
Béla király u. 44.
H-7400 HUNGARIO
Telefona: 82/ 410-664
Retadreso: espbela@t-online.hu
Eldonanto: Kaposvara Esperanto
Centro
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

Multlingveco

Kiom bone estus, se sur la terglobo ekzistus nur unu lingvo, kiun ĉiu komprenas. Malaperus la lingvaj bariloj, kaj kie ajn oni povus komuniki sen malfacilaĵoj.

Nun centoj da lingvoj malfaciligas la ĉiutagajn kontaktojn.

Vane oni lernas mondlingvojn, tiu ĉi scio ne sufiĉas forigi la babelan lingvohaoson.

Kion fari por mildigi tiun ĉi teruran situacion kaj plifaciligi la komunikadon inter diverslingvaj homoj.

Dum jarcentoj naskiĝis multaj planlingvoj. Tie ĉi nun ne estus loko ĉiom listigi. Kompreneble ankoraŭ naskiĝos ankaŭ novaj. Sed mi estas konvinkiginte, neniuj estonta planlingvo povos superi Esperanton.

Antaŭ nelonge mi aŭdis, laŭ kelkaj lingvistoj la Zamenhofa lingvo ne estas perfekta, tial urĝe oni devos eltrovi novan, ĉar la homaro endroniĝos en la abismon de la lingvoj .

Ĉu vere Esperanto ne estus perfekta plenumi tiun ĉi rolon?

Tion mi ne kredas, ĉar dum sia pli ol centjara ekzisto ĝi pruvis, ke centmiloj povas komuniki, labori helpe de tiu ĉi „artefarita lingvo”.

La mondo ne bezonas novan ESPERANTON, ĉar la nuna povas solvi la multlingvecon.

-Redaktanto-



Serĉi laboron

Mia konatulo serĉis laboron. Depost du jaroj li jam estis senlaborulo.

Iumatene li ekvidis gazetanoncon. Oni dungas faklaboriston parolante iun mondlingvon.

Li vivis pli ol dek jarojn en Anglio, kaj dum tio li perfekte ellernis ĉi lingvon.

La gazetanonco gajigis lin. Mia konatulo tuj decidis aliĝi al tiu ĉi posteno kaj li tre esperis, ke li ricevos la laboron.

En la antaŭĉambro de la persona aferoprizorganto atendis almenaŭ dudeko da homoj. Ili ĉiuj deziris dungigi.

Precize je difinita tempo malfermiĝis la pordo kaj la kandidatoj estis vokitaj. Post longa atendado ankaŭ li estis vokita.

En la persona aferoprizorganto ekzamenigis lin. En la angla lingvo li scivolemadis pri lia antaŭaj laboroj.

Ĉio estis en ordo. Ŝajne li estis la plej bona. Li ĝojegis, ĉar li estos elektita. Li laboros.

Fine la persona aferoprizorganto diris:

- Bonvolu montri vian ekzamenodokumenton el la angla lingvo.

-Tion mi ne havas – li respondis mire – Ja mi jam pruvis al vi, ke mi perfekte scias la lingvon.

-Bedaŭrinde sen ĝi mi ne povas dungi vin –li triste diris, kaj li vokis la alian atendanton.

-Ŝaŝa-

Poezio

Vi estas maro de William AULD


Vi estas maro, kiun mi navigas
sen kompasnadlo, sed kun gvidaj
steloj;

sur via sino hula min kavigas
ventegoj aŭ min lulas zefirpeloj ...

Kaj malgraŭ fridoj, spite al la
tromboj,

animo mia ĝojas sur l' ondaro:
mi volas veli plu sur viaj ondoj,
kaj fine droni, droni en la maro ...

HUMURO



Tiu somero

-Jes, okazis antaŭ multaj, multaj jaroj. Mi estis ankoraŭ junulo apenaŭ gustumante la ĝuojn de la plenaĝuloj. Antaŭ nelonge mi ankoraŭ trivadis la lernejan benkon.

Mi pensis, kiam mi iĝos plenaĝulo la vivo plibeligiĝos kaj ĉio estos pli bona.

Ĉu mi eraris? Mi ne scias. Fakte komence la vivo ŝajnis pli bela kaj pli bona. Mi estis libera. Ekde tio neniu rajtis diri al mi: vi ankoraŭ ne estas plenaĝulo.

Mi povis iri kien ajn. Por mi malfermiĝis la tuta mondo. En tiu ĉi granda libereco mi ekkaptumiĝis kaj kiel ebria homo vagadis en la mondo. Ĉien mi deziris iri. Mi revis ekkoni la tutan terglobon.

Rapide mi rekonsciiĝis, ankaŭ tiu ĉi epoko havas limojn, kiuj baras antaŭ mi la vojon.

Komence mi ne volis sciiĝi pri ĝi. Mi pensis, ke la volo kaj persisto superos ĉion. La juneco estis mia alianco. Ĝi defendis min, kiel la sino de la patrino. Tamen ofte ĝi estis malforta, ĉar en la mondo laboris fortoj, kiuj ĉiumaniere volis stumbligi kaj forturni min de sur la difinita vojo.

Dume la jaroj kuregis. Someron sekvis aŭtuno kaj baldaŭ alvenis la vintro. Ni apenaŭ alkitimiĝis la frostajn tagojn, ekaperis la printempaj sunradioj.

Kiam oni ankoraŭ estas juna la tempopaso ne interesas sin. Oni kredas, tiu ĉi stato estos eterna kaj nenio ŝanĝiĝos. Nur post jardekoj komencas doloriĝi la forflugantaj jaroj.

Por mi somero estis neforgesebla, kiun mi neniam povos forgesi. Ĉiam mi devos memori pri ĝi.

Ĉu vi deziras scii, kial? La respondo estas mallonga. Ĉar mi enamiĝis al knabino. Ŝi estas bela, blondulino kun bluaj revemaj okuloj. Tiam por mi ŝi estis mem la diino. Ŝia rigardo tute ĉarmigis min, kaj mi ne povis liberiĝi de ĝi. Se nun, post tiom multe da jaroj, mi malfermas miajn okulojn, mi vidas ŝian ondumantan, blondan hararon, kiel ĝi falis sur mian vizaĝon, kiam ni kisumis arde kaj freneze.

Ho, nun mi rimarkis, kiom rapide forflugis tiu somero!

Kio restis el ĝi?

Nur tristaj memoroj kun belaj bildoi.

Mi volonte returnigus la radon de l' tempo kaj denove karesadus tiun anĝeleton. Sed jam tiuj tagoj neniam revenos.

Kio restis el tiu somero? Mi ofte demandadas de mi. La memoroj estas nur la miaj, alia ĉio malaperis kaj mi maljuniĝis.

Juneco, juneco, tiam oni revas pri vasta kampo, kie miloj da koloraj floroj pompas kaj oni flugas libere, kiel birdo.

Se jam forpasas tiu somero, nur tiam ni ekscias, la tuta vivo estas nur granda trompo.

Tamen ni larmokule pensas pri ĝi, kaj petegas: nur almenaŭ unu momenton por travivi tiujn karajn tagojn. Ni donus ĉion, eĉ eble ankaŭ nian vivon por ĝi.

Bedaŭrinde la forpasinta tempo neniam revenas.

Mi diras al vi, juna amiketo mia, se alvenos tiu somero, ankaŭ via koro ekpulsos je tiu knabino kaj vi ne povos liberiĝi de tiu sento. Ĝi akompanos vin ĝis la tombo. Vi ne povos liberiĝi de ĝi. Vane vi volas forgesi ĝin, tiu somero ĉien akompanos vin.

Mi rekomendas al vi, amiko, lasu, ke tiu ĉi sento ennestiĝu en vian koron.

Se alvenos la maljunaj jaroj kaj vi sidos en vintra vespero apud la varma kahelforno, rememorigu tiujn belegajn momentojn de via vivo.

Ĉiu havas someron pri kiu oni volonte rememoras kaj renkontiĝante kun ĝi en la okuloj ekbrilas etaj larmogutoj.

Jes amiko mia, jen estas la vivo. Ni naskiĝas, amas kaj mortas. El la tri nur la dua estas la rememorinda, ĉar la aliaj ĉiuj estas doloraj.

Do, ni aprecu la amon, kiu orumas nian vivon kaj akompanas nin ĝis la tombo, eĉ plu.

Mi kredas, la vera, sincera amo vivas ankaŭ post la morto.

Mi jam ne estas junulo. Super mia kapo forflugis multaj jaroj. Mi ne scias, kio atentos ankoraŭ min. Mi estas feliĉa, ke mi travivis tiun belegan, neforgeseblan someron.

-Apáti Kovács Béla-



Por infanoj

Knabeto kaj knabineto

Vilaĝfine en malriĉa domo vivis knabeto kun sia patrino.

En iu tago la knabeto ludante kun aliaj geknaboj ekvidis ĉarman knabineton. Ŝi promenis kun sia patro. Ili ambaŭ estis lukse vestitaj.

La viro ĝuste diris ion al sia filino, kiam la knabeto ĵetis rigardon al la knabino.

Li ankoraŭ neniam sentis tian senton. Lia koro ekpulsis kaj li sentis varmegon en la korpo.

La knabineto kaj la viro preteriris lin. Alifoje li certe estus forgesiĝanta ŝin. Sed nun okazis io.

Tage kaj nokte li devis pensi pri tiuj belegaj, bluaj okuloj. Li ne povis liberiĝi de ili. Hejme, kiam li enlitiĝis, en la malhelo ekaperis la vizaĝo de la knabineto.

Kuŝante en la lito li decidis, ke alitage li serĉos la knabineton. Ŝi estu kie ajn en la mondo.

Li ne devis longe serĉi lin, ĉar la knabineto loĝis en belega vilao kaj ili ne longe enloĝiĝis la vilaĝon. Ŝia patro estis tre riĉa homo, tial al la knabineto ne estis permesita ludi kun la vilaĝanaj geknaboj. Alta brikobarilo ĉirkaŭis ilian domon, kiun tri timigaj hundoj gardis.

Vane li provus eniri, la pordego ne estus malfermiĝinta antaŭ li.

La knabeto triste staradis antaŭ la pordego, kaj atendis ĝis ĝi malfermiĝos aŭ la knabineto denove ekaperos.

La patro rimarkis lin ĉe la pordego. Li kolereme diris al li:

-For de nia domo bubo!

La knabeto ne komprenis, kial li estas forsendita. Ja, li faris nenion malbonan.

-Oĉjo, mi deziras amikiĝi kun via filino – li elbuŝigis kuraĝe.

Ekaŭdante tion la viro furioze ekkriis:

-Fripunulo, kiel vi kuraĝis pensi, ke mia karega filinjeto fariĝos via amiko? Se ne malaperos, je la Dio mi vangofrapos vin.

La knabeto ne komprenis la kolerecon de la viro. Kial estas malbona, se li deziras amikiĝi?

(daŭrigota)

-Onklo Adalberto-